Universala Esperanto-Asocio


**AKTIVULA MATURIGO**

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO-2015-40 sendita el Budapeŝto la 26an de aŭgusto.

# JES diras ni pri AMO en Eger jarfine

La koncerna pozitivaĵo estas tamen akronimo por la Junulara Esperanta Semajno (JES), silvestra aranĝo de la germana kaj pola junularoj (GEJ kaj PEJ), kunlabore ĉi-jare kun HEJ, ĉar hazarde la vinfama urbo Eger troviĝas rande de la nordorienta montaro de Hungario.





Ke manifestiĝas amo en junulara renkontiĝo surprizu neniun. Sed aldoniĝas la akronimo AMO, nome la 17a seminario en la progrAMO de UEA pri Aktivula Maturigo okazos kadre de tiu JES en la matenoj de la 28a, 29a, 30a kaj 31a de decembro 2015. Ĉiutage la AMado daŭros tri horojn.

La temo de la seminario estas 'Junigi la komunumon'. Tio estas nova temo ĉe UEA-seminarioj, sed figuras en la nun finredaktata Laborplano de UEA por 2015-2016, tio estas tra la lasta jaro de la mandato de la nuna estraro. Aperos pri la temo artikolo en la novembra revuo *Esperanto*, kiu formos preparmaterialon por la seminario.

La lunda sesio servos por interkonatiĝo kaj prezento de la situacio kaj perspektivoj en la landoj de seminarianoj. En la 31a ni okazigos la kutiman pritaksan, resuman sesion, en kiu ni plie formulos rekomendojn. Tio lasos al seminarianoj la eblon konvene kaj senstreĉe festi la novjaron (v. la foton).



En la ceteraj tagoj ni traktos etgrupe la sepon da subtemoj prezentitaj en la seminara materialo kaj en la revua artikolo, kiu celas diskutigi la legantaron antaŭ kaj post la seminario.

UEA en la sekvaj semajnoj ofertos stipendiojn por junuloj aŭ junulgvidantoj el la Sud-Orienta Regiono de Eŭropo (projekto SORE) ĉar tiu regiono havas generaciajn defiojn. En tiu seminario ni ĉerpos el la spertoj de landoj kun junularaj sekcioj aŭ agado (Hungario, Pollando, Ukrainio k.a.) kaj aŭdos pri la nuna situacio kaj ebloj por progreso en la landoj de la partoprenontoj. Partoprenu en JES kaj anoncu vin por AMO! Informoj: http://jes.pej.pl/2015/



IJS meze de aŭgusto en Szent-gotthard, Hungario – aŭguro por la pli granda JES jarfine en Eger.

## UK atingis cent -- EKO-UKO atingis dek

La memorinda septaga jubilea kongreso de Esperanto estis resumita per dek EKO-komunikoj senditaj tra dek tagoj.  Ni dankas aparte al Marija Belošević el Kroatio pro regula kaj rapida liverado de bonaj fotoj, al Rob Moerbeek pro lingvaj atentigoj kaj al Stano Marĉek pro bona kunlaboro inter la kuriero *Belfrido* kaj EKO.  Ni dankas al ĉiu, kiu kontribuis materialon. La komunikoj estis pretigitaj en limigita tempo per etekrana sursina komputilo kun antikva operacia sistemo, foje en malfacilaj cirkonstancoj. Pro tio neeviteble kaj spite multajn kontrolojn, restis kelkaj eraretoj. De la koncernatoj ni petas pardonon. La tekstoj de tiuj komunikoj nun estas videblaj en la vikio de UEA; tie la eraretoj (la rimarkitaj aŭ raportitaj ☺ ) estas riparitaj. Rigardu ĉe:

http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

*Se tio ne funkcias, provu ĝin sen la fermaj tripunktoj: ni nun laboras por forigi tiujn el la ligo.*

Ni memorigas, ke iu ajn rajtas peti aldonon al la sendolistoj de EKO, sufiĉas sendi al mi la uzendan retadreson. Same, se iu volas ne plu ricevi la komunikojn, mesaĝu, se eble de la retadreso, kiun mi uzas por la dissendoj. Se iu pro portado de tro da ĉapeloj ricevas komunikojn plurfoje kaj tediĝas de tio  – tre pravigebla sinteno – mesaĝu al mi, laŭeble kun indiko pri la kialoj de ricevo kaj kiu(j)n mi forigu.

## Kontaktebloj por la kreanto de EKO-cirkuleroj

Dum ni tuŝas teknikaĵojn, mi menciu, ke la sola fidebla maniero komuniki kun mi estas per retpoŝto. Tra lastaj kvin-ses monatoj mi sukcesis trakti ĉiujn mesaĝojn, tiel ke neniuj mesaĝoj restis kun markigo 'Nelegita'. Certu, ke mi ne reagos al mesaĝoj en *Twee, Twoo, Twat, Twit, Twitter, Twaddle*  aŭ similaj sociaj komunikiloj. Por *LinkedIn* mi ne havas tempon, *Facebook* ricevas nur sporadajn rigardetojn – en la lasta jaro okazis ke en ses monatoj mi ne trovis tempon malfermi ĝin. Pri *Ipernity* eĉ malpli. Do, neniam provu min kontakti pere de tiuj vojoj.

Smg administre por la du supraj alineoj

## Analizo de Strategio por Nova Retpaĝaro de UEA

La Estraro de UEA fine atingas la taskon enordigi la laborojn por kreo de nova asocia retejo. Tiucele ĝi pretigis kaj vaste dissendis  mallongan dokumenton kiu petas proponojn de spertuloj pretigi detalan priskribon de la bezonoj kaj funkciado de la nova retejo, prepare al la malfermo de konkurso por la realigantoj.  La dokumento estas elŝutebla el la TEKO en la retejo de UEA:

http://www.uea.org/l/teko/komitataj/RET_Analizo_de_Strategio_por_Nova_Retpagho_20-08-2015.pdf

Demandojn aŭ ofertojn pri volontula aŭ kontraŭhonoraria laboro bv. direkti al la sekva adreso: novaretpagho@co.uea.org

## ILEI memorigas

Venas la 5-a de oktobro, la Internacia Tago de Instruistoj. UNESKO proponas por 2015 la sloganon, la frapfrazon: "Forta instruistaro por daŭripovaj socioj." UNESKO proponas atenton al la unua lerneja aktiveco, unua lernejo, ankaŭ nomata infanĝardeno. Tie la infanoj komencas ensociiĝi kaj lerni socian vivon kun aliaj infanoj. Tie ili lernas respekti la aliajn infanojn. Videblas, ke multo estas esploranda kaj pripensenda. Se vi en ILEI aŭ en UEA planas specialajn agadojn, vi povas raporti pri tio en la retejo de UNESKO.

## Novaj radio-elsendoj

Radio Rio de Janeiro elsendos programojn tute parolatajn en Esperanto. La estraro de tiu radiostacio aprobis projekton, proponitan en julio, por la pliigo de ĝia aktivado rilate al la Internacia Lingvo. Estos produktitaj du monataj programoj, elsendotaj nur per interreto. La unua, titolita "Esperanto, la Lingvo de Frateco", havos neŭtralan karakteron kaj enhavos muzikon, novaĵojn kaj intervjuojn. La dua, kies nomo estas "La Konsolanto", havos doktrinan trajton, enfokusigante la verkaron de Allan Kardec kaj de spiritismo. La novaj programoj estos disponeblaj por senpagaj realtempa aŭskultado kaj posta elŝutado. Pliajn informojn de: fabhenrique@bol.com.br

## Internacia Tago de la Junularo festita

Merkredon la 12an de aŭgusto 2015 la esperantista junularo de DR Kongo celebris la internacian tagon de la junularo. La ceremonio estis etosoplena, vigla kun ia nepriskribebla bunteco. La salono Yenge vibris kun la muziko ludata de 'la anĝeloj' la muzikgrupo de la pedagogia universitato. Sekvis la prezentado de teatro-spektaklo pri Kimpa Vita, 22-jaraĝa junulino vivante farjrobruligita en la dek sepa jarcento.



Vortoj: mil

PDF kreita de Nuance Power PDF.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.